

ESPERANTO-BULTENO

BULLETIN TRIMESTRIEL. TRIMONATA BULTENO.

№ 10

--- DECEMBRO 1969 ---

XX

Redaktas: Sino J. VINCENT. Rue des Oiseaux -27- LES ANDELYS

Sendu la manuskriptojn antaŭ la 10-a de februaro, 10-a de majo,
10-a de aŭgusto kaj 10-a de novembro.

XX

ENHAVO:

Paĝoj: 1 & 2: Vivo de la grupoj
2: Por la infanoj
3: Federacia kongraso
4: Lingva angulo
Kotiztabelo

VIVO DE LA GRUPOJ.

LE HAVRE. La grupo kunvenis la 11-an de oktobro kaj elektis novan estraron. Prezidantino: S-ino Peltier; Sekretariino: S-ino Turmel; Kasistino: S-ino Gontard.

LES ANDELYS. Fine de septembro malfermiĝis kurso por progresantaj plenkreskuloj. Ĝi okazas en la knabina lernejo merkrede de la 18.30 ĝis la 19.30. Ĝin vizitas 5 homoj. Malfermiĝis ankaŭ kurso por komencantoj. Ĝi okazas en la knabina lernejo ĉiumatene de la 8.15 ĝis la 8.45. Ĝin vizitas 6 knabinoj 9/10-jaraj.

De la 16-a ĝis la 23-a de novembro, la Zamenhofa Kulturcentro akceptis F-inon Kimie Ozawa el Tokio, kiu partoprenis ĉiujn aktivitaĵojn de la Kulturcentro, inter aliaj vesperon en la urbdomo kun prezentado de lumbildoj pri la brita kongreso en Dublin je Pasko kaj pri la UK en Helsinki.

La 14-an de decembro okazos la Zamenhoftago kun komuna tagmanĝo en restoracio kaj prezentado de Esperanto literaturo.

VIRE. S-ro A. Legret partoprenis la internacian renkontiĝon en Grésillon fine de julio.

Malfermiĝis kurso en "Centre Culturel" la 9-an de oktobro sub gvidado de S-ro Colleu, staciestro. Ĝi okazas ĵaŭde je la 20.30.

YVETOT. En la junia ekzamensesio sukcesis en:

Atesto pri Lernado: 2 kandidatoj el Fécamp, 5 el Le Havre, 11 el Yvetot.

Atesto pri Supera Lernado: 1 el Le Havre, 5 el Yvetot.

G-roj Pottier vojaĝis al Nederlando per Esperanto kaj S-ro Saunier partoprenis la UK en Helsinki.

Fine de aŭgusto, kelkaj SAT-estraranoj renkontis Yvetot-anojn por studi la eblecon aranĝi kongreson de SAT-amikaro en Yvetot en 1971.

La ĝenerala kunveno de la Kulturcentro okazis la 8-an de oktobro en la junuldomo.

+++++

POR LA INFANOJ daŭrigo)

LA TAGOJ.

Ho! Neniam Francisko enuas sur la kampoj!

Kiam la ŝafoj estas trankvilaj, li amuziĝas la tutan tagon. Li konstruas dometojn per ebenaj ŝtonoj kaj koto, kiun li knedas en siaj manoj. Li skulptas fajfilojn en la ŝelo de la junaj branĉoj. Li resaltigas ŝtonetojn sur la lageton, aŭ, kelkfoje, li nenion faras: li kuŝiĝas sur la dorso ĉe la piedo de muro el seka ŝtono. La suno, jam alta, lin varmigas. Li fermas la okulojn, kvazaŭ li dormus. Tra siaj fermitaj palpebroj, li vidas aĵojn... brilantajn aĵojn, kiuj supreniras, malsupreniras, dancas. Ili havas ĉiujn kolorojn. Se li malfermas la okulojn, li ne plu vidas ilin.

(daŭrigota)

FEDERACIA KONGRESO.

LES ANDELYS (EURE) 4-an kaj 5-an de aprilo 1970.

--:--:--:--

PROGRAMO:

Sabaton, 4/4/70: ekde la 15-a horo, akcepto de la kongresanoj, disdono de la dokumentoj en la halo de la urbdomo.

16.00: rendezvuo sur la placo Poussin por vizito de la urbo, aŭ : kunvenoj de U.N.E. kaj S.A.T.

18.00: katolika diservo

19.30: komuna vespermango.

Dimanĉon, 5/4/70: 9.00: ĝenerala kunveno de la federacio

12.00: komuna tagmango

14.30: ekskurso al Kastelo Gaillard, komuna foto ĉe la ruinaĵo.

N.B. Bonvolu de nun peti la fervojajn rabatilojn por veturi al tiu kongreso ĉe Centre Culturel et d' Amitié Internationale Zamenhof
8, Bd Néhou 27-Les ANDELYS.

XX

ALIĜILO

Nomo:

Antaŭnomo:

Adreso:

Mi aliĝas al la kongreso kaj sendas kune kun la aliĝilo. F

KONGRESKOTIZOJ:

Individuoj 6 F

Geedzaj paroj 9 F

Studentoj 4 F

Lernejanaroj (11/16-jaraj) 2F

Alilandanoj, blinduloj kaj infanoj (malpli ol 11-jaraj) senpage

Sabata vespermango: ĉ. 15 F

Dimanĉa tagmango : ĉ. 15 F

Prefere pagu per poŝtĉeko aŭ mandato al Fédération Normande des Centres Culturels "Esperanto" c.c.p. Rouen 2348 06 Z, antaŭ la 31-a de marto 1970.

Listo de hoteloj estos sendita al ĉiu aliĝinto, kiu bonvolos mem prizorgi sian loĝadon.

N.B. Se vi veturos kun familianoj, bonvolu plenigi apartan aliĝilon por ĉiu el ili. Uzu ordinaran paperon. Sendu aliĝilon kaj monon al la adreso sub la programo.

Ne forgesu kunporti kantlibrojn kaj muzikilojn por la sabata vespero

Dato kaj subskribo:

EKSTERLANDE, ESPERANTO SEKVAS VIN INSTINKTE !



(A l'Etranger, l'esperanto vous suit partout)

LINGVA ANGULO.

Ofte eĉ plej spertaj esperantistoj ne trovas ĝustan tradukon por iu esprimo, ekz. ramasser(un objet). Post esploro, kelkaj samideanoj opinias, ke la plej taŭga estas "delevi". Alia ekz. doubler(une voiture) kondukis al la esprimo "plupasi".

Se vi mem havas tiajn problemojn, sendu ilin al la redakcio; ni aperigos ilin kaj atendas proponojn de la legontoj. Tiel ni helpos unu la alian. Ĉu tiu ideo plaĉas al vi?

Proponitaj esprimoj: être matinal, conter des fariboles ou des sornettes, anodin, bénin.

Bonvolu sendi viajn tradukojn antaŭ la 10-a de februaro 1970; la plej bona ricevos surprizon.

KOTIZTABELO.

Union des Espérantistes de Normandie.	2 F
p.ĉ.k. Rouen 283-40 E	
U.F.E. { sen "Revue Française" }	6 F
{ kun "Revue Française" }	30 F
U.E.A. { kun Jarlibro }	23 F
{ kun "Esperanto" kaj Jarlibro }	46 F
Fédération Normande des Centres Culturels "Esperanto"	
p.ĉ.k. Rouen 2348-06 Z	

Dépôt légal: 4ème trimestre 1969.

La gérante: Mme J. Vincent.

Polycopié par le Centre Culturel et
d' Amitié Internationale Zamenhof 27-Les Andelys.